
# ESPERANTOLEHTI

Esperanta Finnlando ◆ Esperantobladet ◆ kesäkuu ◆ junio ◆ 3/2006



*Markku Saastamoinen konstatas ke ekslibriso de Joel Vilkki troviĝas en preskaŭ ĉiuj libroj. – Artikolo pri la Esperanto-kolekto en la biblioteko de Somero sur p. 18.*


## Aŭtunaj Tagoj en Haukipudas, p. 12

**Vilho Setälä, p. 5 ◆ Pola Radio, p. 8 ◆ Ĉu komunlingvo? p. 21**
**E-ku – tietoa esperantokursseista / informoj pri E-kursoj, p. 20**

# ESPERANTOLEHTI

## Esperanta Finnlando ◆ Esperantobladet ISSN: 0787-8206

Kielipoliittinen aikakauslehti. Suomen Esperantoliitto ry:n äänenkannattaja.
Språkpolitisk tidskrift. Organ för Finlands Esperantoförbund.
Lingvopolitika periodaĵo. Organo de Esperanto-Asocio de Finnlando.
Perustettu/Grundad/Fondita 1918. Esperantolehti ekde/från 1989 lähtien.
Esperanta Finnlando 1918-23, 1948-53, 1959-1987.
Ilmestyy kuusi kertaa vuodessa. Utkommer sex gånger i året. Aperas sesfoje jare.

**Toimitusryhmä/Redaktionsgrupp/Redakta grupo**: 💻 eaflehti@esperanto.fi
Päätoimittaja/Chefredaktör/Ĉefredaktoro: *Mikko Mäkitalo*
Vanha Hämeentie 41 as. 9, 20540 Turku. ☎ (02) 2373 848 💻 ef_redakto@surfeu.fi
Taitto/Layout/Enpaĝigo: *Ilkka Santtila*
Mannerheimintie 40 D 86, 00100 Helsinki. ☎ (09) 587 6738 💻 ilkka.santtila@welho.com
Vastaava toimittaja/Ansvarig redaktör/Respondeca redaktoro: *Anna Ritamäki*

**Tilaushinta/Prenumerationspris/Abonprezo:** 18 e/vuosi/år/jaro;
Jäsenille/ För medlemmar/ Por membroj: 12 e.

**Tilaukset, osoitteenmuutokset/Abonoj, adresŝanĝoj:**
Suomen Esperantoliitto, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki. ☎ (09) 715 538 💻 eaf@esperanto.fi
**Prenumerationer, adressförändringar:** EAF, Broholmsgatan 15 C 65, 00530 Helsingfors.
**Pankkitili/Bankkonto:** Sampo 800017-230825.

Julkaisija/Utgivare/Eldonanto: Suomen Esperantoliitto ry – Esperanto-Asocio de Finnlando.
Painosmäärä/Upplaga/Eldonkvanto: 400

## Esperanto-Asocio de Finnlando ◆ Suomen Esperantoliitto ry

Fondita/Perustettu/Grundad: 1907

**Prezidanto/Puheenjohtaja/Ordförande:** *Anna Ritamäki*
Brokärrvägen 89, 25700 Kimito. ☎ (02) 423 146 📠 (02) 423 246 💻 eafprezidanto@esperanto.fi
**Vicprezidanto/Varapuheenjohtaja/Vice ordförande:** *Päivi Saarinen*
Ruorimiehenkatu 5 C 23, 02320 Espoo. ☎ (09) 813 3217 💻 paivi.saarinen@iki.fi
**Sekretario/Sihteeri/Sekreterare:** *Tiina Oittinen*
Puutarhakatu 26 A 11, 20100 Turku. ☎ (02) 230 5319 💻 eafsekretario@esperanto.fi

**Aliaj estraranoj / Hallituksen muut jäsenet / Övriga styrelsemedlemmar:**
*Tuomo Grundström*, Anundilankatu 3, 26100 Rauma. ☎ (050) 5180 590, (02) 822 7779 💻 tuomo.grundstrom@lailanet.fi
*Taneli Huuskonen*, Lapinlahdenkatu 23 A 7, 00180 Helsinki. ☎ (09) 694 0964 💻 taneli@poczta.onet.pl
*Markku Saastamoinen*, Siukolantie 9 H 12, 33470 Ylöjärvi. ☎ (050) 327 8528 💻 markku.saastamoinen@jippii.fi
*Börje Eriksson*, Keiturintie 274, 16510 Luhtikylä. ☎ (03) 785 1191 💻 esperarto@phnet.fi

**Vicestraranoj/Varajäsenet/Suppleanter:**
*Timo Pirinen*, Rinnetie 11-13 D 32, 06650 Hamari. ☎ (040) 592 1756 💻 timo.pirinen@gmail.com
*Raita Pyhälä*, Jykyrintie 3, 69440 Lestijärvi. ☎ (06) 863 7351 💻 saliko@kase.fi
*Marjaliisa Parpala*, Utinkatu 45 B 7, 45200 Kouvola. ☎ (040) 717 4521

**Kasisto/Rahastonhoitaja/Kassör:** *Tiina Kosunen*
Viittakorpi 2 D 22, 02280 Espoo. ☎ (09) 813 3024 💻 eafkasisto@esperanto.fi
**Pankkitili/Bankkonto (EAF):** Sampo 800017-230825.

**Peranto de UEA / Maksut UEA:lle / Betalningar till UEA:**
Sampo 800020-5995369 (UEA/EAF Päivi Saarinen)
Adreso ĉe la EAF-oficejo. / Käytä Suomen Esperantoliiton toimiston osoitetta.

**Oficejo/Toimisto/Kontor:** Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki, avoinna tiistaisin klo 17-19.
☎ (09) 715 538 (puh.vastaaja/respondilo). Malfermita: marde 17-19-a horo.

**Internet**: http://www.esperanto.fi



# Arta Lumo – ni realigu logan festivalon!

Arta Lumo – jen la nomo de nia sekvasomera festivalo. Per abunda, altkvalita programo ni allogu vastan, internacian publikon al Kuopio, urbo fama pro sia kultura vivo, de la 27a de julio ĝis la 1a de aŭgusto 2007. La alventago estas vendredo, la ferma tago merkredo. Tiel partoprenontoj de la sekvajara Universala Kongreso en Jokohamo povos senurĝe kaj komforte pluvojaĝi per iu de la ĉiutagaj rektaj flugoj al Japanio.

Nun estas tempo ekinstigi kunlaborantojn, disvastigi informojn kaj inviti artistojn. Ni ne nur amase reklamu en la someraj eventoj, sed ankaŭ atentu la artojn dum ni ĉeestas en i.a. Baltaj Esperanto-Tagoj (Kuressaare), UK (Florenco), Internacia Junulara Festivalo (Sarajevo) kaj espereble ankaŭ en Festo, kultura festivalo de JEFO kaj Eurokka en Kastelo Grezijono (20-27.8.2006). Ni povos trovi talentulojn invitindajn.

Pensu vaste! Povas temi pri kantado aŭ palindromkreado, pri poezio aŭ teatra trupo. Ĉu vi mem havas artan talenton? Malkaŝu ĝin aŭ atentigu pri via tro modesta esperantista najbaro! Kontaktu min aŭ iun ajn estraranon! Ni ankaŭ kreis apartan retadreson *ArtaLumo@esperanto.fi*. Kiam vi legos tion ĉi ni jam vizitis la muzikan centron kaj scias pli pri la okazejoj kaj aliaj praktikaĵoj. Vi estos informitaj pri la evoluoj!


Nian jubilean monkolekton kun tutlanda permeso ni strebas starti aŭtune. Ni taksas ke donacantoj estos plejparte niaj propraj membroj. Ni estas malfermaj al ideoj por allogi kontribuojn de tiuj, kiuj ne parolas nian lingvon. La monon ni bezonas por vere sukcesi pri la ambiciaj jubileaj planoj, sed ankaŭ por krei bonan financan bazon por la dua EAF-jarcento. Se ni havos malpli da mono ni faros malpli, sed ni certe diligente laboros – tion vi povas fidi.

Donacoj ekster la oficiala kolekto estas kompreneble daŭre bonvenaj, same testamentoj. Utiligante la oficejon kaj agante por disvastigo de esperanto ni ĉiutage ĝuas la fruktojn de la Propra Ejo -kolekto kaj la heredaĵo de gesinjoroj Linja. Nia ĉiama strebo estas respekti la dezirojn de la donacantoj. Pro la heredaĵo ni povas ĉiujare inviti eksterlandan instruiston. Pro tiucela donaco tri personoj ricevis stipendion por la esperanto-kurso en Valamo.

Nia instruisto Atilio Orellana Rojas antaŭ la kurso ĵaŭde (29.6) vizitos Turkuon, kie la ĝenerala publiko estas invitita al provleciono (Café Art je la 17a) kaj sekvatage li kontribuos al plena esperantotago en Hämeenlinna (Café Canel ekde la 12a kaj ĉelaga vesperumado). Cetere, Finnlando jam ĉi-jare logas. La kurso havas aliĝintojn ankaŭ de Svedio, Francio kaj Ĉinio.

Luman someron, kaj artan kaj naturan, al vi deziras

*Anna Ritamäki*



# Esperantoa pelikentille

Neil Hardwick joskus vuosia sitten halusi lyödä vetoa, että Marsista löytyy elämää ennen kuin Suomi voittaa euroviisut. En tiedä, toteutuiko Hardwickin vedonlyönti, mutta vastaus hänen asettamaansa kysymykseen on lopulta selvinnyt. Lordi teki sen, minkä ehkä ehdimme jo uskoa olevan mahdotonta, kun omasta mielestämme hyvätkin euroviisukappaleet olivat kerta toisensa jälkeen jääneet viimeisille sijoille. Marsin elämän olemassaolosta voidaan edelleen arvailla ja lyödä vetoja, onko sitä olemassa.

Urheilun ystävien eräs kestokysymys on se, milloin Suomi ensimmäisen kerran selviytyy jalkapallon MM-lopputurnaukseen. Viime viikkoina olemme saaneet seurata, miten Ruotsi tässäkin kilpailussa tavoittelee taas kerran hyvää menestystä.

Ei ehkä ole kovinkaan syvällistä tutustumista tietyn maan kulttuuriin katsella kyseisen maan joukkueen esiintymistä pelikentällä, vaikka jotkut jalkapallokommentaattorit ovatkin vakuuttuneita, että eri maitten joukkueitten pelitavat kuvastavat yleisemminkin maan asukkaitten kansanluonnetta. Uskonvaraiseksi asiaksi jää, kuinka paljon tämä pitää paikkaansa ja kuinka paljon jalkapallon katselija vain tulkitsee näkemänsä maajoukkueen peliä kyseistä maata koskevan stereotypiansa mukaiseksi.

Äskettäin tehdyn Yhdysvaltain kansanterveysviraston koordinoiman tutkimuksen mukaan kansallisuuksia koskevat stereotypiat eivät yleisesti pidä edes paikkaansa. Tutkimuksessa, jota referoi Tiede-lehti numerossa 1/2006, neljätuhatta ihmistä 49 eri maasta kuvaili omiansa ja tuntemiensa ihmisten ominaisuuksia ja oman kansallisuutensa tyypillistä edustajaa. Koehenkilöt arvioivat itsensä ja tuttavansa totuudenmukaisesti, mutta tyypillisen kansalaisen piirteitä eivät.

Kommunikointi jalkapallokentällä eri maista tulevien pelaajien ja ottelun erotuomarien välillä ei aina ole ongelmatonta. Nyt pelattavissa MM-kisoissa helpotetaan ainakin erotuomarien keskinäistä ymmärrystä sillä, että yhdessä ottelussa kentällä olevat kolme tuomaria ovat aina kotoisin samasta maasta.

Nykytekniikalla voidaan televisionkatsojille välittää pelikentän äänimaisemaa mikrofoneilla, jopa pelaajien tai tuomarien asusteisiin kiinnitetyillä langattomilla mikrofoneilla. Jääkiekon MM-kisoissa on joinakin vuosina katsojille tarjottu viihdettä tuomalla osa tuomarien puheesta televisiolähetykseen. Viihdettä kyllä, mutta välillä mentiin tahattoman komiikan puolelle, kun tuomarit keskustelivat huonolla englannilla eivätkä oikein aina onnistuneet ymmärtämään toisiaan. Pelaajien puheitten tuominen katsojien korviin luultavasti tarjoaisi lähinnä mahdollisuuden oppia laajan varaston erikielisiä kirosanoja.

Nyt on esperantonharrastajilla tavoitteena saada seuraaviin jalkapallon MM-kisoihin Esperanto-joukkue. Kuvissa, joita näkee mm. www-sivustolla *www.laloko.org*, joukkueen pelaajien olemus ei näytä niin ammattiurheilijamaisen tasoiselta, että heidän oikean paikkansa voisi uskoa olevan MM-lopputurnaus, mutta toivotettakoon heille onnea ja menestystä.

*Mikko Mäkitalo*



# Vilho Setälä, la granda pioniro de Esperanto

Vilho Setälä estas internacie konata kiel verkanto de lernolibroj. Li naskiĝis en 1892. Lia patro estis profesoro E.N. Setälä kaj patrino estis tradukisto kaj verkisto Helmi Krohn. Setälä ne apartenas al unuaj esperantistoj, sed lia aktivado grandparte influis al tio, kia estis la sukceso de Esperanto en Finnlando ĝis la 1980-aj jaroj. Aparte dum la skismo de Esperanto-movado li agis kiel neŭtrala gvidanto de la esperantistaro.

Setälä komencis lerni Esperanton en jaro 1906, kiam li feriis en kamparo en orienta Finnlando. Tiam li jam estis lerninta la svedan en lernejo kaj spertis malfacilaĵojn: la ideo de internacia lingvo tuj allogis lin. Li lernis Esperanton memstare kaj kun siaj lernejaj kamaradoj. Ili ankaŭ tradukis svedan ŝlosilon de Esperanto en la finnan. La ekesto de Ido forlogis lin de Esperanto por pluraj jaroj.

En 1911 Setälä renkontis en universitato alian studenton Leo Jalava kaj li vizitis ankaŭ kunsidon de La Polusstelo, esperanta societo de Helsinki. Tiam Setälä komencis denove studi Esperanton kaj la jam lernitaj lingvoj, germana, franca, angla kaj latina, helpis lin multe. En 1912 fondiĝis Studenta Societo Esperantista, kies kasisto estis Vilho Setälä. Li ankaŭ aliĝis al UEA kaj fariĝis delegito en 1914. En universitato li studis matematikon, kemion kaj fizikon kaj magistriĝis en 1922.

En 1914 la finnlanda Turisma Societo sendis lin por prelegi en meza Eŭropo kaj donis subvencion de 2000 markoj (en nuna mono pli ol 6000 eŭroj). Setälä prelegis en Britio, Nederlando, Belgio kaj li alvenis al Francio. Li planis partopreni la 10-an Universalan kongreson en Parizo kaj poste daŭrigi vojaĝon tra Germanio, Ĉeĥio kaj Danio. En Parizo li renkontis ankaŭ estontan profesoron Kalle Väisälä, kiu ankaŭ planis partopreni la kongreson. Ili atingis la kongresurbon ĵus antaŭ la komenco de la milito kaj promenis en la urbo kune kun hungara esperantisto. La eksterlandanoj kaptis atenton de aŭtoritatuloj kaj la triopo estis arestita pro suspekto pri spionado por Germanio. La finnoj vekis kromajn suspektojn, ĉar ili havis pasportojn de la Rusa Imperio, sed ili tute ne parolis la rusan. La malagrabla situacio solviĝis kiam alvenis esperantista policisto, kiu konfirmiĝis pri la senkulpeco de la finnoj.

En 1917 Setälä edziĝis kun Aini Sigrid Halinen, kun kiu li havis kvin infanojn. La geedziĝo daŭris ĝis 1954. Post la milito, jam en 1918 komencis aperi gazeto Esperanta Finnlando, kies adreso estis simple Vilho Setälä, Mikkeli. La nova gazeto aperis parte en la finna kaj parte esperante kaj ĝia celo estis helpi lernadon de Esperanto apud la lernolibro de Setälä. Tiutempe li ankaŭ tradukis literaturon el la finna, ekzemple *Batalo pri la domo Heikkilä*.

La unua lernolibro de Setälä aperis jam en 1917 kaj ĝis 1924 lia *Esperanta legolibro* aperis

en kvar eldonoj entute en 18 800 ekzempleroj. Laŭ takso farita en 1936 lernolibroj kaj vortaroj de Setälä aperis entute en 76 000 ekzempleroj. Parto el ili nature vendiĝis eksterlanden.


En 1920 Setälä fondis Esperanto-Instituton de Finnlando kaj sukcesis havigi por ĝi ŝtatan subvencion.

Granda eldonejo Otava publikigis en jaro 1919 entute 11 malgrandajn librojn pri Esperanto, kiujn Setälä redaktis. Li mem verkis plurajn el ili kaj tradukis parton el aliaj. En 1920 kaj 1922 aperis ankoraŭ po unu libreto. Otava komencis eldoni en 1920 gazeton Esperanta Finnlando tute en Esperanto. Tamen fine de 1922 Otava ĉesis Esperantan Finnlandon, sed plu eldonis lernolibrojn. Setälä plu laboris en Otava ĝis 1940 kaj redaktis krom Esperanto-lernolibrojn ankaŭ *Praktikan hejman fakvortaron* (Kodintaitosanakirja). Li ankaŭ tradukis el pluraj lingvoj kaj evoluigis teknikan fakvortaron en la finna. Ekzemple la fotografia fakvortaro estas grandparte lia kreaĵo.

En 1932 li fondis propran fotejon en Helsinki kaj en la fino de 1930-aj jaroj li ankaŭ instruis fotado-teknikon en profesia lernejo. En 1943 Setälä eldonis kelkajn numerojn en finnlingva revuo pri fotado (Kamera; Fotilo) sed pro malmultaj abonantoj devis ĉesi ĝin post la unua jaro.

Post la dua mondmilito Setälä estis plu gvidanto de la Esperanto-Instituto kaj li prelegis pri Esperanto diversloke kaj organizis kursojn. En 1948 li refondis gazeton Esperanta Finnlando, kiun li redaktis ĝis 1974 (dum 1954-1958 la gazeto ne aperis).

UEA elektis Setälän kiel honoran membron jam en 1933. Li estis ankaŭ membro de Akademio de Esperanto ekde 1930 kaj de Lingva komitato ekde 1921. Ankaŭ en Esperanto li kunlaboris en fakvortaro pri fotografio.




Dum la skismo de Finnlanda Esperanto-movado Setälä plu agis en sia propra Instituto, kiu estis kvazaŭ neŭtrala tegmenta organizo, kiun subtenis kaj la neŭtrala kaj la laborista asocioj. Nur kiam la skismo komencis mildiĝi Vilho Setälä estis elektita prezidanto de EAF en 1955 kaj li havis tiun postenon ĝis 1963.

Same en 1955 estis fondita Fondumo Esperanto, kies komencan kapitalon formis la terpeco posedita de Marke Setälä, ekde 1955 la dua edzino de Vilho, en Iirislahti en Espoo kaj la domo posedita de Vilho Setälä. La fondumo eldonis plu la librojn de Setälä kaj al ĝi apertenis la aŭtoraj rajtoj de Setälä. La celo estis daŭrigi la agadon por Esperanto post la morto de gesinjoroj Setälä.

En 1958 aperis internacia lernolibro *Privilegia vojo al lingvoscio* kaj ĝi fariĝis la plej fama internacia memlerna libro de Esperanto. Ĝis 1981 Privilegia vojo aperis en 25 000 ekzempleroj.

Esperanto-Asocio de Finnlando elektis Setälän kiel honoran prezidanton en 1979 kaj samtempe produktis medalon honore al li. La medalo estas bronza kaj havas devizon de Vilho: "Kaj lukti fidele pro lumo".

Kiel 80-jara li publikigis verkon *Suomen kielen dynamiikkaa* (Dinamiko de la finna lingvo), kiu estis studo pri son- kaj literstatistiko de la finna, farita per komputilo. Pro lia plurflanka agado la filozofia fakultato de Universitato de Helsinki invitis lin honora doktoro en 1973. Komputiloj igis lin ankaŭ aktiva subtenanto de ortografia reformo de Esperanto. Nome, kiel 90-jara, en 1982, li volis forigi la supersignajn leterojn, kiuj tiutempe malhelpis uzon de Esperanto en komputiloj.

Vilho Setälä forpasis en 1985 kaj lia heredinto estis la Fondumo Esperanto. La fondumo poste

vendis la domon de Setälä kaj komencis disdoni stipendiojn en 1990-aj jaroj. La vivo de Setälä daŭras en la fondumo.

Krom Esperanto Setälä aktivis ankaŭ en aliaj movadoj: en 1930-aj jaroj li estis inter aktivuloj de liberpensula societo kaj ekde 1938 li apartenis al estraro de la hobiaj fotistoj de Helsinki (nuntempe Helsingin kameraseura). En fotografio li verkis lernolibrojn pri fotado, sed ankaŭ la unuan, kaj ankoraŭ valoran, finnlingvan prezenton de fotado kiel arto (Valokuvaus tieteenä ja taiteena; Fotado kiel scienco kaj arto) en jaro 1940 (parte reeldonita en 1982).

En 1982 kiam li fariĝis 90-jara la Finnlanda televido prezentis pri li dokumentan filmon ”La 90-a printempo”. Setälä estis homo, kiu ne agis laŭ la formalaj normoj de la socio, sed ĉiam sekvis siajn proprajn idealojn kaj serĉis alternativojn al la reganta pensmaniero. Setälä havis plurajn interesojn kaj aktivadojn, sed la intereso al Esperanto estis la plej longedaŭra kaj plej grava el ili.

*Jukka Pietiläinen*

## Junuloj el kvar landoj partoprenis la Eŭropan Amikeco-Seminarion, EAS-2006

Ĉi-jare en la vojaĝo al Francio partoprenis Anna kaj Maija el Somero kaj Miamaria el Ylöjärvi. Kune kun junuloj el Kroatio, Portugalio kaj Slovenio ili dum tri tagoj dum EAS-2006 lernis pri Eŭropo, kantis kaj ludis, uzante la internacian lingvon. Oni ankaŭ preparis programon por 15 gelernantoj de Jokelan lukio, kiuj alvenis al Strasburgo nur por partopreni al Euroscola.

Dum la Euroscolatago la 26an de aprilo oni parolis plejparte la anglan, sed la knabino kiu prezentis la finnan lernejon parolis france. Ŝi menciis ke ŝia grupo enhavis ankaŭ junulojn kiuj lernis esperanton. En unu el la laborgrupaj raportoj la esperantolernantoj sukcesis enŝovi mencion pri esperanto kiel lingvo de la estonto.

*(raportis Carola Antskog)*



***Miamaria Saastamoinen (fi), Tina Tisljar (hr), Marjana Schmitran (si) kaj Anna Mäkitalo (fi) preparas sin por prezenti dialogon en esperanto kaj finna dum vespera programo kune kun grupo el Jokelan lukio la 25an de aprilo.***

# Jorma 40-jara vizitanto ĉe la Pola Radio

Turku-ano Jorma Ahomäki estas longtempa aŭskultanto de Pola Radio. Li komencis sekvi elsendojn el Varsovio jam en la jaro 1959. En januaro 1960 oni registris lian unuan korespondaĵon en la ĉefurbo de Pollando. Oktobre 1961 oni premiis lin pro interesa korespondaĵo la unuan fojon. Venis tempo por viziti en la redaktejo la unuan fojon junie 1966. Post tio pasis kvardek jaroj. La 5-an de junio 2006 okazis la 11-a vizito de Jorma Ahomäki en Esperanto-redakcio.

Lige kun la dimanĉa leterkesto la 9-an de junio 2006 ĉe la mikrofono en Pola Radio ĉeestis samtempe la triopo Andrzej Pettyn, Barbara Pietrzak kaj Jorma Ahomäki. Sendube ĝi estis nostalgia momento por ili ĉiuj.

La evento estis inspira ankaŭ por aliaj. La franca esperantisto, verkinto de la Matematika vortaro, 2003, membro de la Akademio de Esperanto Marc Bavant skribis la jenan mesaĝon al la redakcio:

*Kara Barbara,*

*Mi ŝatus kore gratuli vin, inkluzive de Jorma kaj Andreo, por la tre simpatia leterkesto kun Jorma Ahomäki, finna veterano de Esperanto kaj samtempe de Pola Radio. Konsiderante, ke mi unuafoje vizitis vian redakcion en la jaro 2002a estos al mi malfacile superi lian 40-jaran rekordon, sed mi klopodos!*

*Plej amike,*
*Marc*

Multaj homoj ĉirkaŭ la tuta mondo sekvas regule la elsendojn, kiel Marc kaj Jorma, sed la ĉiutagaj elsendoj estas tiom bonkvalitaj kaj facile aŭskulteblaj ke ili valorus eĉ pli grandan aŭskultaron.

La regulaj elsendoj en esperanto komenciĝis la 4-an de aprilo de la 1959-a jaro. Ekde la uzo de interreto signife vastiĝis la rondoj de la aŭskultantoj. En la redakcio laboras Milada Szwedo, Michal Wyszogrodzki, Wojciech Usakiewicz, Anna Limont, Barbara Pietrzak (estro), Gabriela Kosiarska, Jerzy Uspienski, krome Ewa Krach kaj Andrzej Pettyn.

La redakcio vaste informas pri Pollando kaj dediĉas apartan atenton al la vivo de la esperantistaj medioj kaj demokrata lingvokomunikado. La jena instigo aperas en la retpaĝa sinprezento de la redakcio: "Multaj temoj en niaj elsendoj estas pritraktataj laŭ peto de niaj geaŭskultantoj. Vian kontakton ni atendas senpacience."

Pola Radio interrete:
*www.polskieradio.pl/polonia/eo/*

(*La informojn donis Jorma Ahomäki kaj Pola Radio*.)



***En la foto de maldekstre Milada Szwedo, Barbara Pietrzak, Gabriela Kosiarska kaj Jorma Ahomäki, kiu ricevis denove premion pro interesa korespondaĵo.***

# Ne estas “adiaŭ”, estas “ĝis baldaŭ”

Kiam mi flugis al Romo, mi estis tre nervoza. Mi estis survoje al la Internacia Junulara Festivalo, kiu ĉiujare okazas dum la paskaj ferioj. Mi ne sciis kie Torricella estas kaj mi ne parolis bone esperanton, mi estis komencantino. Je mia miro mi kaj Antti Tahvanainen sukcesis alveni al la festivalejo. Mi konfesas ke mi komprenis nur la italan, ĉiuj parolis tre rapide esperanton kaj Antti devis traduki preskaŭ ĉion. Mi ankaŭ sopiris mian patrinon.

La sekvan tagon alvenis pli da festivaluloj. Ĉiuj estis tre afablaj kaj mi komencis kompreni pli la diskutojn. La vetero estis bonega, mi ŝatis la varmon ĉar ni ankoraŭ havis neĝon en Finnlando! Ni havis multajn alternativojn kiujn ni povis fari. Mi ludis retpilkon sen reguloj, lernis danci ”bachatan”, estis kaŝema homlupo kaj studis malregulajn verbojn, ĉu vere? Ni ankaŭ kantis la karaokeon, mi estis iomete trista ĉar mi ne povis kanti iun de Tiziano Ferro. La ekskursoj al Isola Polvese, Perugia kaj Assisi estis bonegaj! La pejzaĝoj estis tre belaj, estis varme kaj mi ŝatis la kompanion.

Kompreneble ni havis ankaŭ komikajn momentojn. Ni dancis La Bambon kaj estis tre amuze, sed mi estas iomete kolera al Antti ĉar li ne klarigis pli frue kia la danco estas… Mi tamen amuziĝis kvankam mi estis ĉiam meze de la rondo. Ni kantis Sanmartinon, la internacian kanton, en multaj lingvoj en la Internacia vespero kaj ankaŭ en eleganta picejo en Assisi.

Mi ŝatis ĉion en IJF: homojn, programon, ekskursojn, manĝaĵon, lokon… Mi neniam pensis ke ”mi ne scias kion fari”. Mi ne volis adiaŭi la aliajn en la stacidomo, sed iu diris al mi ke ne estas ”adiaŭ”, estas ”ĝis baldaŭ”. Mi partoprenos la venontan IJF:n kaj mi esperas ke mi renkontos miajn novajn geamikojn denove. Mi multe lernis esperanton – kaj ankaŭ la italan – kaj nenio estas pli amuza ol lerni lingvojn en bonega kompanio.

*Siru Laine*



***Amuzaj momentoj dum la IJF. Siru estas la blondulino en ambaŭ fotoj.***

## UK en Florenco: jam pli ol 2000

La 91-a Universala Kongreso en Florenco (29 julio – 5 aŭgusto) estos la tria sinsekva UK kun pli ol 2000 aliĝintoj. La 8-an de junio ĝi arigis 2039 aliĝintojn el 61 landoj. En la historia statistiko de 91 UK-oj momente 28 kongresoj estas pli grandaj.

En la plej freŝa nombrado Francio reprezentiĝas en pinto kun 283 aliĝintoj, Italio dua kun 254. El Japanio venos tre granda grupo por bonvenigi la kongresanojn al la venontjara UK en Jokohamo: ĝis nun aliĝis 179 japanoj. La limon de cent superas ankaŭ Germanio kaj Pollando.

*(el komuniko de UEA koncizigis mm)*

## Aperis bulteno de la Jokohama UK

En formo de faldfolio el ok paĝoj aperis la Unua Bulteno de la 92-a Universala Kongreso de Esperanto, kiu okazos en la japana havenurbo Jokohamo de la 4-a ĝis la 11-a de aŭgusto 2007. La kolore ilustrita folio priskribas koncize la kongreslandon kaj ĝian kulturon, la urbon kaj kongresejon, kaj listigas la kongresajn perantojn.

La Unua Bulteno estas dissendita kun la julia-aŭgusta numero de la revuo ”Esperanto” kaj ĝin ricevos la partoprenantoj de ĉi-jara UK. Aliĝilon oni dissendos kun la septembra ”Esperanto”. Post la ĉi-jara UK eblos aliĝi al la venontjara en UEA-retejo.

*(el komuniko de UEA koncizigis mm)*

## Centkapa publiko en Malferma Tago

Plena cento da vizitantoj plenigis la domon de UEA en Roterdamo la 13-an de majo. Nur unufoje antaŭe la ”printempa” Malferma Tago altiris pli da vizitantoj: en aprilo 1998 je la 90-jariĝo de UEA.

Stefan Maul, konata ĉefredaktoro de la De-guĉi-premiita revuo MONATO, parolis pri siaj riĉaj spertoj kiel Esperanta ĵurnalisto. Kadron por lia prelego prezentis lia libro, ”El verva vivo ĵurnalista”, eldonita pasintjare. Maul kontribuis al la programo ankaŭ sub tute alia ĉapelo, tiu de profesoro Ruĝnazul’, kiu katenis la publikon per sia humurplena prezento. Vladimir Samodaj, profesie ĵurnalisto kiel Maul kaj honora membro de UEA, prelegis pri la Esperanto-movado en Sovetunio kaj Rusio de la 60-aj ĝis la 90-aj jaroj kaj prezentis la Esperantan revuon ”Scienco kaj kulturo”, kiun li redaktas.

Petro Balaz prezentis premiere la filmon ”Vizito al la Centra Oficejo”, kiun li reĝisoris kaj kiu plejparte estis filmita en la lastnovembra Malferma Tago. La hispana artisto David Maroto montris filmregistraĵon de kvizo, kiu okazis en marto dum la Muzea Nokto de Roterdamo.

La venonta Malferma Tago de la Centra Oficejo okazos sabaton, la 25-an de novembro 2006.

*(el komuniko de UEA koncizigis mm)*

## Muut lehdet

Turussa ilmestyvä ilmaisjakelulehti Turkulainen noteerasi vielä lyhyesti Suomen Esperantoliiton talvipäivien jälkeen Auralan kansalaisopistossa esillä olleen Esperantoa esittelevän näyttelyn. Lehti ilmestyi 29.3.2006. Jutussa mainittiin myös, että Esperantoa on harrastettu Turussa 100 vuotta ja että Turusta on tehty kaupunkikartta Esperantoksi. Siinä esitellään kaupungin nähtävyydet ja palvelut.

Turun Sanomien uutisessa 30.3. mainittiin, että Suomen Esperantoliitto on palkinnut Dolchamar-bändin keulahahmon Patrik Austinin ”Aganto de la jaro – Vuoden esperantoaktiivi 2005” -tunnustuspalkinnolla. Hänen ansionaan esitettiin esperantokulttuurin edistäminen ja innovatiivisten opetusmenetelmien käyttö.

Myös Helsingin Sanomat noteerasi Patrik Austinin palkitsemisen Aganto de la jaro -tunnustuspalkinnolla Palkitut-palstalla 29.3.2006.

## Jarfine al IF

Ni bonvenigas vin al nia sukcesa kaj tradicia novjara aranĝo, ĉi-jare en germana Saarbrücken, en komforta junulara hotelo. Utiligu niajn rabatojn kaj plej malaltajn kotizojn ĝis 30 junio!

Pliajn detalojn kaj aliĝilon vi trovas en niaj interretaj paĝoj: *www.internacia-festivalo.de*

La proksimeco de Saarbrücken al la franca najbaro (nur 10 km al la iama limo) influis nian kadran temon, ni invitas al Francio – per prelegoj, filmoj kaj tuttaga ekskurso al Strasburgo (fakultativa oferto, kun restoracia vizito).

*HDP / Hans-Dieter Platz*
*(organizanto, HDP@internacia-festivalo.de)*

## Inter Karsto kaj Adriatika maro

**Trieste, Italio, 6-12 aŭgusto 2006**

En programo estas promenadoj en urbo kaj montarlando, naĝado, vizitoj en groto, botanika ĝardeno kaj muzeoj, muziko kaj teatro. Organizas la Esperanto-asocio en Trieste.

Adreso: Esperanto, C.P. 601, IT 34100 TRIESTE CENTRO. Rete: *esperantotrieste@adriacom.it*
*http://arte.triesteincontra.it/esperanto/*

## Letervesperu en antikva Samarkando

Aŭguste kaj septembre 2006 samarkandaj esperantistoj okazigos la internaciajn letervesperojn, dediĉitajn al 15-jariĝo de sendependeco de Uzbekistano kaj al 2750-jariĝo de Samarkando, Monda Heredaĵo de UNESKO. Ni atendas viajn gratulmesaĝojn, kaj, se eble, ĉiuspecajn (kaj ĉiulingvajn!) materialojn (leterojn, vojaĝrakontojn, gazetartikolojn, librojn, broŝurojn, poemojn, kantojn, fotojn, desegnaĵojn, dokumentojn ktp) pri Uzbekistano kaj Samarkando. Ĉio ajn pri la temoj, inkluzive fotojn de stratoj, vendejoj, restoracioj, hoteloj, komunumoj, kompanioj, varoj ktp estos bonvenaj. La plej interesajn materialojn ni publikigos en nialanda gazetaro. Ĉiuj senditaĵoj estos eksponataj en la speciala ekspozicio. Anticipan dankon por viaj kontribuoj.

*Anatoli Ionesov, Direktoro*
*Internacia Muzeo de Paco kaj Solidaro*
*P.O. Box 76, UZ-140100 Samarkando*
*Respubliko Uzbekistano*
*Telefono/fakso: +998 (66) 233 17 53.*
*http://www.aliaflanko.de/urbo/samarkand/muzeo.html*
*Retadreso: imps86@yahoo.com*



***FEJO-EsperHe-stando en la mondvilaĝa festivalo (Maailma kylässä) en Helsinki 27-28 majo. De maldekstre Taneli Huuskonen, Baiquan Fan, Timo Pirinen, Sini Jurvanen, Mira Anonen, Paula Niini-korpi.*** *(Fotigis Baiquan Fan)*

# Esperantoevento kun multflankaj spertoj: de ŝtonepoko al orgenkoncertoj

## *Aŭtunaj Tagoj en Haukipudas 16.-17.9.2006*

Esperanto-societo en Oulu aranĝos kunlabore kun EAF Aŭtunajn Tagojn en komunumo Haukipudas, kiu situas ĉirkaŭ 20 km norden de Oulu. La ĉefa eventejo estas la hotelo Samantta, kien eblas veni jam vendrede.

Sabatmatene 16-an de septembro estos aranĝita tuj post la alveno de matenaj trajnoj komuna bustransporto el la ĉefa fervoja stacidomo de Oulu al Haukipudas (kostoj tien-reen 10 e). En hotelo Samantta atendas matenmanĝo, kaj tuj poste tiuj, kiuj volas povas partopreni en la ekskurso al la ŝtonepoka Kierikki-centro en Yli-Ii. Tie troviĝas interesa muzeo, kie vizito okazos sub gvidado de loka ĉiĉerono. La partoprenkotizo de la ekskurso estos 20 eŭroj.

En Haukipudas okazos samtempe informa elementa kurso de Esperanto celita por lokaj komencantoj kaj aliaj kiuj interesiĝas pri la internacia komuna lingvo.

Post Kierikki-ekskurso ni lunĉos en hotelo Samantta kaj malfermos la tagojn. Sin prezentas la komuno Haukipudas kaj kompreneble Esperanto-societo de Oulu. Krome antaŭ la kafo ni aŭdos informojn de EAF.

La vespera programo komenciĝos kun konatiĝo de la preĝejo de Haukipudas, kiu estas fama pri pentraĵoj de preĝej-pentristo Mikael Toppelius. En la preĝejo estos publika koncerto de esperantisto-orgenisto Esa Toivola el Kuopio, kiu estas ankaŭ internacie konata.

Post la vespermanĝo en la hotelo eblos ankoraŭ libera kunestado ekzemple babilante kaj kantante. Noktemuloj povos poste amuziĝi en la hotela restoracio.

Dimanĉmatene KELF verŝajne aranĝos la tradician matenpreĝon. Poste la programo daŭros kun salutoj de UEA: Osmo Buller venos rakonti pri internaciaj kaj universaj aferoj. EAF informos pri aranĝoj por la jubilea jaro 2007 kaj invitas ĉiujn kontribui en ĝi.

Post la tagmanĝo nin atendas ankoraŭ unu interesa travivaĵo: konatiĝo kun la vivo kaj kaptado de petromizoj sub gvidado de loka specialisto. La tagoj estos fermitaj kiel kutime ĉe komuna kafumado, kaj tiam estos jam tempo por plej multaj partoprenantoj reenveturi kun la komuna buso al Oulu. La buso veturigos nin al la fervoja stacidomo.

### Aliĝo kaj kontaktpersonoj

Aliĝu tuj! Kiel vi jam alikutimiĝis pri AT/VT-aranĝoj, bonvolu sendi la aliĝilon al la EAF-oficejo de Helsinki aŭ se vi volas aliĝi rete, uzu la adreson *eafmendoj@esperanto.fi*. Krome pagu la kotizon al la konto de la Asocio uzante la referencnumeron. Notu, ke estas tre grave fari ambaŭ: kaj pagi kaj sendi la aliĝilon por ke la organizantoj scios, kiu volas kion dum la AT kaj kiam kiu venos partopreni la programon.

Kun eventualaj demandoj pri la tranoktoj ekzemple en 1-lita ĉambro, manĝoj kaj pri vojaĝeblecoj per trajno vi povas turni vin al la EAF-sekretario Tiina Oittinen. Lokaj kontaktpersonoj en Oulu kaj Haukipudas estas Erkki Röntynen, 040-5288138, *erkki.rontynen@luukku.com* kaj Auli Vihermä, *aulin@mail.suomi.net*, 040-721 7897. Pri la aliĝiloj prizorgas kiel kutime Päivi Saarinen kunlabore kun la EAF-kasisto. Bonvenon!

# Esperantotapahtuma kivikauden ja urkumusiikin hengessä

***Syyspäivät Haukiputaalla 16.-17.9.2006***

Tämänvuotisten syyspäivien järjestelyistä vastaa Oulun Esperantoseura yhdessä Suomen Esperantoliiton kanssa. Syyspäivät ovat Haukiputaalla 16.-17.9.2006. Päätapahtumapaikkana on hotelli Samantta, jonne voi halutessaan tulla jo perjantai-iltana.

Lauantai-aamuna heti aamujunien saavuttua lähtee yhteinen bussi Oulun rautatieasemalta Haukiputaalle (bussikuljetus edestakaisin 10 e). Hotellilla odottaa aamiainen, jonka jälkeen halukkaat voivat lähteä retkelle Yli-Iihin Kierikin kivikautiseen keskukseen. Kierikki-keskukseen tutustumme paikallisen oppaan johdolla. Retki maksaa 20 euroa.

Haukiputaalla alkaa lauantai-aamupäivänä esperanton alkeis- ja tutustumiskurssi, johon voi osallistua syyspäivien osallistumismaksulla. Kurssi on tarkoitettu ensisijaisesti paikallisille aloittelijoille tai muuten esperantosta kiinnostuneille.

Haukiputaalle palataan noin kello 13.00 lounaalle hotelli Samanttaan. Päivät avataan heti lounaan jälkeen. Haukiputaan kunta ja Oulun Esperantoseura esittäytyvät, lisäksi ennen kahvia on ohjelmassa liiton tiedotteita.

Iltaohjelma on Haukiputaan kirkossa. Ensin tutustutaan kirkon kuuluisiin maalauksiin, jotka on tehnyt kirkkomaalari Mikael Toppelius parisataa vuotta sitten. Illan pääohjelma on yleisölle avoin urkukonsertti, jossa esiintyy kansainvälistä mainetta saanut, esperantoakin taitava urkuri Esa Toivola Kuopiosta.

Konsertin jälkeen on iltaruokailu hotellilla ja sitten on mahdollisuus vapaaseen yhdessäoloon

**Aliĝilo**

Mi aliĝas al la Aŭtunaj Tagoj de EAF 16.-17.9.2006 en Haukipudas.

Nomo

______________________________

Adreso

______________________________

Tel./fakso/ret-adreso

______________________________

**Aliĝkotizo:**

14 e ĝis 31.7.2006 ____

18 e ĝis 25.8.2006 ____

21 e poste ____

Duono por FEJO-anoj sub 30 jaroj. Infanoj sub 15 jaroj sen aliĝkotizo.
Personoj loĝantaj ekster Finnlando laŭ interkonsento.

**AT-paketo 16.-17.9.**

inkl. tranoktadon (2-lita ĉambro) en hotelo Samantta kaj manĝojn (tagmanĝoj ambaŭtage, vespermanĝo sabate, kafoj) 80 e ___

Buso Oulu-Haukipudas-Oulu
(10 e, pagota surloke) ___

Kierikki-ekskurso (20 e por
30-persona grupo, pagota surloke) ___

**Entute pagenda al la konto de EAF** _____

Pagoj al la konto: **Sampo 800017-230825**.
Bv. uzi la VT-referencnumeron **4640**.

Pliaj informoj aŭ deziroj:

______________________________

______________________________

Bonvolu sendi la aliĝilon al:
Esperanto-Asocio de Finnlando
Siltasaarenkatu 15 C 65, FIN-00530 Helsinki
Retaj aliĝoj tra *eafmendoj@esperanto.fi*

**Ilmoittautumislomake**

Ilmoittaudun Suomen Esperantoliiton syyspäiville 16.-17.9.2006.

Nimi

---

Osoite

---

Puh./fax/sähköposti

---

**Ilmoittautumismaksu:**

14 e 31.7.2006 saakka ___

18 e 25.8.2006 saakka ___

21 e 25.8.2006 jälkeen ___

Puoli maksua FEJO:n varsinaisilta jäseniltä. Ilman maksua alle 15-vuotiaat lapset. Suomen ulkopuolella asuvat henkilöt sopimuksen mukaan.

**AT-paketti 16.-17.9.** sis. yöpymisen 2-hh hotelli Samanttassa ja ruokailut (2 lounasta, illallisen, kahvit) 80 e ___

Bussi Oulu-Haukipudas-Oulu (10 e, maksu paikanpäällä) ___

Kierikki-retki (20 e 30-hengen ryhmälle, maksu paikanpäällä) ___

**Maksut yhteensä Suomen Esperantoliiton tilille** _______

Tilinumero: **Sampo 800017-230825**. Käytä viitenumeroa **4640** (ei muita tietoja maksun yhteydessä).

Lisätietoja ja/tai toivomuksia:

---

---

Lähetä lomake osoitteella:
Suomen Esperantoliitto, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki, tai tiedot sähköpostitse: *eafmendoj@esperanto.fi*

jutellen ja esimerkiksi laulaenkin. Yökyöpelit voivat jatkaa iltaa hotellin ravintolassa.

Sunnuntai-aamu alkaa todennäköisesti KELF:n järjestämällä aamuhartaudella heti aamiaisen jälkeen. Päivät jatkuvat Osmo Bullerin terveisillä Esperanton maailmanliiton (UEA) päämajasta. Oman liittomme, EAF:n, juhlavuoteen 2007 valmistaudumme yhdessä; liiton toimihenkilöt kertovat järjestelyjen nykytilasta.

Lounaan jälkeen tutustumme nahkiaisten jännittävään elämään paikallisen nahkiaistenpyytäjän opastuksella. Päivät päättyvät yhteiseen kahviin, jonka jälkeen lähtee bussikuljetus Oulun rautatieasemalle.

## Ilmoittautuminen ja yhteyshenkilöt

Ilmoittaudu heti! Totuttuun tapaan lähetä ilmoittautumislomake Suomen Esperantoliiton toimistoon tai ilmoita vastaavat tiedot sähköpostilla osoitteeseen *eafmendoj@esperanto.fi*. Maksa osallistumis- ja pakettimaksut ilmoittautumisen mukaisesti liiton tilille. Muista käyttää viitenumeroa, jonka kanssa ei pidä kirjoittaa muita tietoja. Huomaa, että pelkkä maksun hoitaminen ei riitä, tarvitsemme myös ilmoittautumistiedot, jotta tiedämme mitä olet tilannut ja milloin tulet. Majoitusta (huom. saatavissa myös 1 hh), ruokailua ja matkustusvaihtoehtoja koskevia asioita voit tiedustella liiton sihteeriltä Tiina Oittiselta tai paikallisilta Oulun yhdistyksen yhteyshenkilöiltä Erkki Röntyseltä (puh. 040-5288138, *erkki.rontynen@luukku.com*) ja Auli Vihermältä (*aulin@mail.suomi.net*, puh. 040-7217897). Ilmoittautumislomakkeista ja maksuista huolehtii tuttuun tapaan Päivi Saarinen yhteistyössä liiton rahastonhoitajan kanssa. Tervetuloa!

★

*Välkomna till Haukipudas för att delta i esperantoförbundets höstdagar med stenålderskultur, nejonögon och orgelmusik.*

# Estraro kunvenis

La estraro kunvenis 22.4.2006 (kunsido 5/2006) 11.30-15.55 en la oficejo (Ritamäki, Oittinen, Huuskonen, Saarinen, Grundström, Parpala, Pirinen, kasisto Kosunen).

La estraro konstatis kaj elektis la funkciulojn kaj la komisiitojn de la Asocio por la laborperiodo 2006 ĝis la sekva jarkunsido.

Estraro de fonduso Propra Ejo: Anna-Liisa Heikkinen, Harri Laine (elektitaj en 2004 de jarkunveno), Jukka Laaksonen (elektita de EAF-estraro)

Estraro de junulara fonduso: AR (EAF), Paula Niinikorpi (FEJO), vice PS (EAF), Pipsa Ahonen (FEJO).

Interreto: EAF: Päivi Saarinen (kunordiganto), Jukka Pietiläinen (prizorganto); rajtoj por EKH: Sakari Kauppinen; FEJO: Mikko Mäkitalo (Patrik Austin); EsperHe: Mira Anonen.

Instruado kaj lernomaterialo, kontaktoj kun ELFI: Tiina Oittinen.

Valamo-grupo: Tiina Oittinen (kunordiganto), Carola Antskog (ELFI), Sylvia Hämäläinen, Jukka Laaksonen kaj Raita Pyhälä.

Prelegvojaĝoj (turneoj): Tiina Oittinen; Stipendioj: Päivi Saarinen; Jura konsilanto: Sakari Kauppinen; Doma kompanio Siltasaarenkatu 15: Anna-Liisa Heikkinen.

Oficeja grupo: Päivi Saarinen, vice Tiina Oittinen (EAF) kaj Taneli Huuskonen (EKH).

Oficeja biblioteko: provizore Päivi Saarinen.

Libroservo: Päivi Saarinen; Ĉefdelegito de UEA: Päivi Saarinen.

Membroregistro kaj adresaro: provizore Päivi Saarinen.

Suomen YK-liitto (UN-asocio de Finnlando): Anna Ritamäki, Markku Saastamoinen.

Nordia kunlaboro kaj membroasocia instigado: Markku Saastamoinen.

Kunlaboro kun orient-eŭropaj landoj: Marjaliisa Parpala.

Eŭropa agado, komitatano de EEU: Anna Ritamäki, anstataŭanto Carola Antskog.

Vortara grupo (ne aktiva): Jouko Lindstedt (ĉefredaktoro), Osmo Buller, Riitta Hämäläinen, Harri Laine, Raita Pyhälä (redaktoroj por vortaj artikoloj). AR: EAF-kontaktulo de la grupo.

Esperantolehti: Redakta grupo: Mikko Mäkitalo (ĉefred.), Anna Ritamäki (respondeca red.), Ilkka Santtila (teknika redaktoro). Konstantaj kunlaborantoj: Raita Pyhälä, Jukka Laaksonen, Seija Kettunen (Jyväskylä), Jukka Noponen (muut lehdet), Riitta Hämäläinen kaj Katja Lampinen (FEJO), Taneli Huuskonen (EKH), Tiina Oittinen (Turku, sekretario de EAF), observantoj: PS kaj Jukka Pietiläinen.

AKK-grupo: AR, PS, TO, TG, MS + J. Pietiläinen + P. Austin.

Krome kadre de AKK: Movada historio de Finnlando, historia grupo: J. Laaksonen, C. Antskog, J. Pietiläinen, M. Mäkitalo; Biblioteka konsilgrupo: PS + Paula Harju, Sirkka Mattlin, Tuuli Åkerman.

Apartan atenton la estraro donis al la situacio de la vortara grupo. Necesas trovi solvon. La prezidanto interkonsentos pri kunveno kun Jouko Lindstedt por klarigi la situacion. [La prezidanto kunvenis kun JL en Helsinko 26.5.2006. Granda laboro estas farita, sed necesas trovi novan gvidan strukturon por la daŭrigo. Lindstedt havas tro multajn aliajn okupojn por dediĉi sin al la vortara laboro.]

La oficeja grupo interkonsentis pri ŝlosiloj, deĵorado kaj pri ĝenerala prizorgado de la oficejo (biblioteko, purigado ks.). Raporton faris Päivi Saarinen.

La estraro informiĝis ke FEJO/EsperHe lastminute ricevis lokon en Maailma kylässä -ekspozicio kaj festivalo 27.-28.5. en Helsinki. La partopreno okazas kadre de la AKK-projekto (kostoj sub Alekstera informado, Informaj agadoj).

La estraro informiĝis pri preteco donaci al EAF monon ekvivalentan al 3-foje partoprenkotizo 210 e = 630 e por stipendioj al Valamo-kurso. Tial eblas vaste anonci pri subvenciebleco. ▷

▷ Markku Sarastamo faris subvencipeton por eldono de la fabellibro *Kreivitär ja hänen huikea elämänsä* dulingve, esperante *La grafino kaj ŝia fantasta vivo*, tradukis Saliko. La celo bone kongruas kun la AKK-celoj. La estraro planas decidi pri la sumo en sia sekva kunsido.

La estraro decidis pri la kotizoj por Aŭtunaj Tagoj en Haukipudas 16.-17.9.2006.

EAF aliĝis al movada foiro dum UK en Florenco. Tie eblos reklami la asociajn aranĝojn dum 2006 (AT) kaj speciale dum la jubilea jaro 2007.

La estraro deziras ke ĉeestu EAF-reprezentanto en la 100-jara jubilea festo de Sveda Esperanto-Federacio, kiu okazos 26.-28.5. en Malmö. [Fine neniu povis iri sed EAF sendis gratulmesaĝon]

Tuomo Grundström informiĝis pri monkolektaj aferoj cele al tutlanda jubilea monkolekto.

La estraro decidis, ke la internacia artfestivala aranĝo okazos ekz. 4 tutajn tagojn, antaŭ la UK en Jokohamo (fine de julio 2007). La vicprezidanto jam provizore konatiĝis kun retpaĝoj de Kuopio kaj informiĝos pri detaloj pri okazigo tie. Vojaĝeblecoj al Japanio devas esti klarigitaj.

La estraro decidis havi la sekvan kunsidon 11.6.2006 en la oficejo en Helsinki.

## Eventokalendaro de EAF

**2006**

30.6.2006 Esperantopäivä Hämeenlinnassa – Esperantotago en Hämeenlinna (EAF)
3–7.7.2006 Esperantokursoj en Valamo (Valamon kansanopisto)
29.7–5.8.2006 Universala Kongreso, Florenco, Italio (UEA)
6–13.8.2006 Internacia Junulara Kongreso, Sarajevo, Bosnio (TEJO)
16–17.9.2006 Aŭtunaj Tagoj, Haukipudas (Oulu-regiono)
14.10.2006 Koulutuspäivä "Tiedotteesta telkkariin, otsikosta eetteriin", Helsinki (EAF)

**2007**

28.4.2007 100-jariĝo de EAF, Helsinki
27.7–1.8.2007 Festivalo Arta Lumo, Kuopio

**Laborkunsido**

26.8.2006 EAF-estraro en la oficejo

## Saloklubo aktivas

La ĝemelurba kunlaboro inter Salo kaj la nordiaj urboj Katrineholm, Odder kaj Vennesla nun bone funkcias. Ĉi-jare tri saloanoj vizitis Svedion kaj post unu jaro la klubo invitas esperantistojn de la ĝemelurboj.

Ĵaude la unuan de junio mi kun la prezidanto Eero Saari vizitis la gimnazion Salon lukio. Ni informetis pri esperanto al la tuta lernejo kaj havis informstandon dum unu horo. Estis tie ĉiam iu lernanto kun kiu ni povis diskuti, sed nur sep lernantoj respondis nian kvizon.

Dimanĉe la 9an de julio la klubo renkontiĝos en Kimito-Kemiö. Cao Xionglin el Ĉinio tiam kune kun kvin aliaj ĉinoj vizitos nin. Li tre ŝatas kolekti E-filatelaĵojn kaj gajnis arĝentan medalon en Tut-landa Filatela ekspozicio. Li kunportos parton de sia kolekto. Ankaŭ Martti Vihanto venos por diskuti kun Cao pri ilia kuna hobio. Ankaŭ li kunportos filatelaĵojn.

Ni aranĝos ekspozicieton de la 12a ĝis la 4a horo en Källkullen, Brokärrvägen 89. Ĉiuj kiuj havas interesajn leterojn aŭ poŝtkartojn estas bonvenaj montri ilin. Ni ekaranĝos la ekspozicion je la 10a horo. Oni ankaŭ povas veni nur por babileti aŭ ĝui la someran naturon. Estos eblecoj manĝeti aŭ kafumi. La aranĝo estas malferma por ĉiuj, esperantistoj kaj neesperantistoj.

*Carola Antskog*
*vicprezidanto de Esperantoklubo de Salo*

# Nia kasisto sin prezentas

Mi nomiĝas Tiina Kosunen kaj estas nun la nova kasisto de EAF. Estas interese lerni novan taskon.

Mi loĝas en Espoo kun mia familio: edzo, tri filinoj kaj unu filo. Ankaŭ ni havas du ĉarmajn katinojn, kiuj tre ŝatas somerumi en nia somerdometo en Loviisa.

Esperanto estis ĉiam parto de mia vivo, ĉar miaj gepatroj estas esperantistoj: patrino ekde la juneco kaj patro post la UK 1969. La distanco inter Dipoli-kongresejo kaj nia hejmo estis nur kelkaj kilometroj, do pluraj kongresanoj loĝis ĉe ni. Iu havis ruldomon kaj kelkaj tendumis sur la korto. Aliaj tranoktis en la domo. Tiu gastigado daŭris tra jardekoj kaj multnombro da samideanoj vizitis la hejmon de familio Kilpinen.

Mia unua Esperanto-evento estis tendaro en Vääksy 1971. Post tio mi partoprenis al kelkaj kursoj kaj kongresoj. Mi tre ĝuis vojaĝi en Esperantujo dum la jaroj. Ankaŭ mi renkontis mian hungaran korespondamikinon en Budapeŝto 1983. Mi ricevis sufiĉe multajn korespondpetojn kiam mi estis junulardelegito kaj kun kelkaj mi eĉ korespondis. Antaŭ 20 jaroj mi estis membro de FEJO kaj partoprenis iam kaj tiam al landaj agadoj. Feliĉe mi havis pasintjare eblecon kongresi en Vilno.

Esperanto multege helpis kaj inspiris min lerni fremdajn lingvojn en la lernejo. Tamen mi plej alte taksas Esperanton. Mia revo estas ke ni povus instrui nian belan kaj unikan lingvon al infanoj kaj tiel donaci lingvoscion al novaj generacioj.

*Tiina Kosunen*



***Tiina Kosunen kun konteltiroj kaj aliaj dokumentoj dum estrarkunsido en la oficejo.*** *(Foto: amr)*

## Koulutuspäivä lokakuussa

”Tiedotteesta telkkariin, otsikosta eetteriin”, Laatua viestintään -projektin (AKK) koulutuspäivä tiedottamisesta, päätettiin siirtää lokakuuhun. Uusi päivämäärä on 14. lokakuuta. Paikka: Helsinki (ylioppilaskunnan tilat). Aika: 10-18.

Tule saamaan rautaisannos tiedottamisen eri lajeista, tiedotusvälineiden toiminnasta ja tavoista saada viestisi kuuluviin ja näkyviin! Koulutuspäivän vetävät tiedottaja, FM Riitta Hämäläinen ja toimittaja, medianomi (AMK) Katja Lampinen.

Osallistujamaksu: 15 e/hlö (sis. lounaan ja kahvin). Matkakulukorvaus, omavastuu 30 e.

Ilmoittautumiset/Lisätietoja: Tiina Oittinen, Puutarhakatu 26 A 11, 20100 Turku, puh. 050-5494709, *eafsekretario@esperanto.fi*

# Valora librokolekto en la biblioteko de Somero

La Al kvalita komunikado -grupanoj kaj estraranoj Anna Ritamäki, Päivi Saarinen, Tiina Oittinen kaj Markku Saastamoinen kun ano de la biblioteka konsilgrupo de EAF/AKK Paula Harju kunsidis en la biblioteko de Somero la 8an de aprilo 2006. La vizitanta AKK-grupo sub gvido de ĉefa bibliotekisto Elina Rasa konatiĝis kun la Esperantokolekto en la biblioteko de Somero (finne: Someron kirjaston esperantokokoelma/Joel Vilkki -kokoelma), kiun la heredantoj de Joel Vilkki donacis al la biblioteko en 2001.

La biblioteko celas enmeti la informojn pri la libroj en sian datumbazon, sed tio, pro multaj aliaj farendaĵoj, verŝajne povos realiĝi nur post jaroj. Intertempe pruntado de la libroj eblas per simpla, permana sistemo. Laŭ nia takso temas pri proksimume 1000 eroj (20 bretoj). Krom libroj tie troviĝas revuoj kaj malgrandaj printaĵoj ekz. urbaj prospektoj, ankaŭ jarlibroj kaj kongresaj libroj (la kongresa libro de 1922 estas en pli bona stato ol tiu de EAF) kaj kelkaj binditaj jarkolektoj de Esperanta Finnlando. Preskaŭ ĉiuj libroj enhavas ekslibrison de Joel Vilkki.



*Elina Rasa kun la historiaj verkoj pri esperanto en Turku ricevitaj de Tiina Oittinen.*

La kolekto estas bele prezentita en la biblioteko kaj estas tre valore ke publika biblioteko en nia lando posedas tian kolekton. Aparte ni publikigas la tekston pri la kolekto de la bibliotekaj retpaĝoj. EAF deziras kunlabori kun la biblioteko por simpligi la prizorgon de la kolekto, interalie per lingva helpo laŭbezone, sed malklaras ĉu ni sukcesos prioritati bibliotekan evoluigon inter la amaso da aliaj taskoj, kaj ordinaraj asociaj kaj jubileaj.

Tiina Oittinen, kiu ankaŭ estas prezidanto de Esperanto-societo en Turku, donacis al la biblioteko la historietojn de societo (1906-1981, 1982-1991 kaj 1992-2005); en la unua parto estas mencioj ankaŭ pri Joel Vilkki. Kroma donaco estis esperantlingva Turku-prospekto de 1994. EAF krome decidis sendi Esperantolehti – Esperanta Finnlando al la biblioteko.

Post la konatiĝo ni esperantistoj kunsidis. Paula Harju klarigis pri la diversaj katalogoj en la biblioteka mondo, intealie pri tio kiel katalogado funkcias praktike. Ekzistas nacia bibliografio Fennica en kiu estas registritaj libroj, gazetoj kaj aliaj eldonaĵoj eldonitaj nialande kaj, kvankam ne same komplete, alilandaj ligitaj al Finnlando.

En Finnlando ekzistas sistemo laŭ kiu la presejoj ĉiam liveras ses ekzemplerojn de ĉiuj eldonaĵoj (i.a. libroj, gazetoj, afiŝoj kaj broŝuroj) al la universitata biblioteko de Helsinki por konservo en la bibliotekoj kun liberekzemplera rajto (vapaakappale/friexemplar): la universitataj bibliotekoj de Helsinki, Jyväskylä, Oulu, Turun yliopisto, Åbo Akademi kaj la parlamenta biblio-

teko. Tiel ankaŭ nialandaj esperantaj eldonaĵoj estas konservitaj.

Rilate al biblioteka evoluigo ni konstatis ke konkretaj fareblaĵoj estas bindado de la jarkolektoj de Esperanta Finnlando kaj esploro pri financado por prizorgo de la esperantlingva libra heredaĵo de Finnlando. Pri niaj hereditaj libroj eblas konstati ke tiuj de Vilho Setälä kune kun la libroj de Ahto Linja nun troviĝas en la oficejo (ne plu en stokejo) kaj bezonus listigadon. La komputila listo kun la libroj de la oficeja biblioteko ne inkluzivas la Setälä-Linja librojn. Ni diskutis pri ebleco oferti praktikuman lokon al studento en nia biblioteko, sed tiu ideo ne realiĝis.

Ni volas danki al Anna-Liisa Heikkinen kaj Ritva Sabelli, kiuj prizorgis la bibliotekon dum pluraj jaroj. Nun ni bezonas novan bibliotekan prizorganton. Provizora prizorganto estas Päivi Saarinen.

*Anna Ritamäki*




***Tiina, Markku, Päivi kaj Paula kun la bibliotekestrino Elina Rasa ĉe la Esperantokolekto.***

---

*Someron kirjaston verkkosivuilla kirjoitetaan esperantokokoelmasta:*

## Joel Vilkin esperantonkielisten kirjojen kokoelma

Joel Adiel Vilkki (8.8.1899-14.7.1976) oli Someron yhteiskoulun rehtori vuodesta 1929 vuoteen 1960. Hän oli opettaja, puutarhuri ja esperantisti, jonka kirjoittamasta Suomi-esperanto-suomi -taskusanakirjasta on ilmestynyt useita painoksia. Suomen Esperantoliiton puheenjohtaja Jukka Laaksonen on sanonut, että "maailmanlaajuiselle esperantistien joukolle Somero on Vilkin ansiosta tunnetuin yksittäinen paikkakunta Suomessa". Esperantossa *somero* tarkoittaa kesää.

Vilkillä oli laaja esperantonkielinen kirjasto, jonka hänen perikuntansa on lahjoittanut Someron kirjastolle. Kokoelmassa on mm. Baudelairen, Cervantesin, Danten, Dickensin, Goethen, Ibsenin, Kiven, Lagerlöfin, Lorcan, Maupassantin, Pushkinin, Shakespearen ja Strindbergin teoksia sekä Raamattu ja Kalevala.

## E-ku – informoj pri Esperanto-kursoj

La instruista asocio ELFI startas longe atenditan servon: retliston, kiu informas pri esperanto-kursoj en Finnlando. Ĝia nomo estas E-ku, instigo al ekstudo en Esperanto-kursoj.

La unua mesaĝo, pri la kurso en Valamo, estis sendita en junio al 12 retadresoj kolektitaj de FEJO/EsperHe en la mondvilaĝa festivalo. La ekon de la E-ku-listo prizorgas la prezidanto de ELFI Carola Antskog. La celo estas bone servi la organizantojn de kursoj same kiel ĉiujn, kiuj volas esti daŭre informitaj pri aktualaj kursoj.

Se vi estas ano de la retlisto EAF-agadas vi ne devas aliĝi al E-ku. Vi aŭtomate ricevos la samajn informojn. (EAF-agadas estas listo ĉe Yahoo Groups. Ĝi estas malferma por membroj de EAF, inkl. de kluboj, ELFI, FEJO kaj Steleto. Informiĝu ĉe *eafprezidanto@esperanto.fi*.)

### Kiel aliĝi al E-ku?

Sendu al la E-ku-estro la sekvajn informojn:

– persona kaj familia nomoj
– retadreso
– plena perpoŝta adreso (aŭ nura loĝurbo)
– eventualan informon pri jamaj esperanto-scioj aŭ specialaj interesoj pri esperanto, samtempe eblas peti ankaŭ provnumeron de Esperanta Finnlando aŭ aliajn informojn

### Kiel informi pri kursoj pere de E-ku?

Sendu al la EAF-agadas-listo aŭ al la E-ku-estro la sekvajn informojn en la lingvo(j) de la celgrupo:

– nomo de la kurso
– tempo kaj loko
– organizanto kaj instruisto
– priskribo (niveloj, metodoj)
– kotizo
– aliĝinformoj (limdatoj, kontaktinformoj)

La retadreso al la E-ku-estro estas *E-ku-estro @esperanto.fi*

*Carola Antskog, E-ku-estro*

## E-ku – tietoa Esperanto-kursseista

Suomen opettajien esperantoyhdistys, ELFI, on aloittanut pitkään odotetun palvelun: sähköpostilistan, johon esperantokursseista kiinnostuneet voivat ilmoittautua saadakseen tietoja Suomessa järjestettävistä kursseista. Lista on nimeltään E-ku (Esperanto-kurssit) ja siitä huolehtii ELFIn puheenjohtaja Carola Antskog.

E-ku-listalle ilmoittaudut lähettämällä seuraavat tiedot osoitteeseen *E-ku-estro@esperanto.fi*:

– koko nimesi
– sähköpostiosoitteesi
– osoitteesi (tai ainakin asuinpaikkakuntasi)
– oletko jo tutustunut esperantoon ja/tai mahdollisesti jo hieman opiskellut sitä

Saat sähköpostiisi tietoja Suomessa järjestettävistä esperantokursseista, joista voit valita sinulle sopivimman. Voit myös samalla tilata Esperantolehden näytenumeron.

*Carola Antskog, E-ku-estro*
*(listan ylläpitäjä)*

## E-ku – information om Esperanto-kurser

Lärarnas esperantoförening i Finland, ELFI, har startat en länge önskad/saknad tjänst: en e-postlista som de intresserade kan anmäla sig till för att få information om esperantokurser i Finland, Listan kallas E-ku (Esperanto-kurser) och handhas av ELFI:s ordförande Carola Antskog.

För att anmäla dig till E-ku-listan skickar du följande uppgifter till *E-ku-estro@esperanto.fi*:

– för- och efternamn
– din e-postadress
– din adress (åtminstone ort)
– hur mycket du redan vet om esperanto.

På samma gång kan du beställa ett provnummer av Esperantolehti – Esperantobladet eller begära annan information.

*Carola Antskog, E-ku-estro*
*(listans upprätthållare)*

## Komunlingvo por kvalita komunikado

Esperanto ĝenerale ricevas iel senvalorajn malindajn adjektivojn: artefarita lingvo aŭ planlingvo (keinotekoinen kieli, suunnitelmakieli) aŭ pontolingvo (siltakieli).

Mi petas kaj proponas ke vi faru decidon kaj regulon ke ni esperantistoj respektu ĉiam kaj ĉie Esperanton per adjektivo komuna lingvo – komunlingvo (yhteiskieli – yleiskieli) kaj ke ni ĉiam korektu ekz. ĵurnalistojn kaj raportistojn ke ili uzu tiun "yhteiskieli".

*Salutante Anja Launiainen*


*EAF (Al kvalita komunikado) ricevis la supran leteron, kiun ni ricevis rajton publikigi. Ni ne decidis pri iu regulo, sed jam uzis la vorton "yhteiskieli" en gazetara komuniko. Nin interesas viaj opinioj pri la diversaj vortoj uzitaj por priskribi nian lingvon.*

*Anna Ritamäki*

## Leo Teräntö forpasis

La 21-an de aprilo 2006 mortis pro kancero Leo Teräntö, malnova membro de Esperanto-Klubo de Lahti. En sia vivo Leo havis tri gravajn aferojn: Baha'i, pri kiu li interesiĝis jam 50 jarojn, Esperanto 45 jarojn kaj muziko. Li kantis longe i.a. en Lahti-koruso kaj kelkajn jarojn en Pihlaja-koruso. Li naskiĝis 1931.

*La memoro de Leo Teräntö*
*vivas longe en nia E-rondo*
*Lahden Esperanto-Kerho*



# Kreivitär kohtaa matkimustutkailijan

*Markku Sarastamon satukuvia ja sadun esineitä on ollut esillä Alajärvellä. Tässä näyttelytiedote.*

Alajärven MakasiiniGallerian kesäkuun kutsunäyttelyn vieraaksi saapuu mies, jonka esittelyssä sanat ja henki meinaavat kerta kaikkiaan loppua kesken. Markku Sarastamo (58) on hämeenlinnalainen esperantisti, illusionisti, itetaiteilija, keksijä, kirjailija ja käsityöläinen sekä vielä judokakin.

”Kreivitär kohtaa Matkimustutkailijan” -näyttelyn – tai ”kosmisen puheenvuoron”, kuten Sarastamo näyttelyään itse nimittää – työt kumpuavat taiteilijan alitajunnan onkaloista. Ne ovat koostuneet viimeisen kymmenen vuoden aikana osioiksi, joista on syntynyt mm. cd-romeja, näyttelyitä, tietopelejä, satukirja ja satutunteja.

Sarastamon näyttelyn kreivitär viittaa Sarastamon 2005 julkaistuun satukirjaan ”Kreivitär ja hänen huikea elämänsä”. Kääntäjä-toimittaja Tero Sallamo toteaa teoksesta mm. seuraavaa:

”Kirjan päähenkilö seikkailee naivistisen älykkäässä unenomaisessa maailmassa, erilaisten tosi- ja satuhahmojen seurassa. Lempeänjännittävä tarina on opettavainen ja viihdyttävä, ainutlaatuinen kuvitus ryhdittää kertomusta ja vie lukijan syvemmälle fantasiamaailmaan. Vaikka tarinan fyysisiä ulottuvuuksia voikin pitää lähinnä kosmisina, löytyy siitä kuitenkin kosketuspintoja arkimaailmaamme.”

Sarastamo työstää parhaillaan kreivittären seikkailuista kaksikielistä (esperanto – suomi) versiota. Sarastamo toteaa kyseessä olevan elämänmittaisen projektin, jonka hän toivoo tuottavan iloa kaikille lähimmäisilleen. Kreivittären seikkailuihin on aikanaan luvassa myös jatkoa: Sarastamon päässä muhii tarina nimeltään ”Kreivitär ja kultaisen padogin arvoitus”.

Sarastamon eräänlaisiksi alter egoikseen luomat ”matkimustutkailija Sampo Sarastar” ja ”komentajakapteeni Marcus Aurelius Sarastus” ovat ihastuttaneet lapsia ja lapsenmielisiä eri puolilla maata jo yli kymmenen vuoden ajan. Telluksen kosmisiin iskujoukkoihin kuuluvan matkimustutkailija Sampo Sarastarin seikkailut vievät päähenkilönsä viidakosta kuninkaanlinnan kautta tuntemattomalle planeetalle. Sampo Sarastarin tarina on tekijänsä mukaan kosmista naivismia puhtaimmillaan. CD-romin ja tekstiosion lisäksi satuun kuuluu runsaasti viidakosta löydettyä jäämistöä, joista merkillisin lienee matkimustutkailijan viestintävälineenään käyttämä, Kalevalan tarujen Sammolle sukua oleva yliheittäjänalipaiskaaja.

”Kreivitär kohtaa Matkimustutkailijan”. Markku Sarastamon satukuvia ja sadun esineitä. Näyttely on avoinna 29.5.-30.6. arkisin 8-15.30 ja pe 8-14. Tiedustelut: *sarastamo@gmail.com*




***Kreivittären ja Ujon Ritarin juhliin saapuu Itämainen Sirkus, jonka virallinen kieli on esperanto.*** *(Kirjasta Kreivitär ja hänen huikea elämänsä)*

# Suomen Esperantoliiton jäsenjärjestöt

**Muutokset ja lisäykset osoitteistoon: Ilkka Santtila, Mannerheimintie 40 D 86, 00100 Helsinki, s-posti *ilkka.santtila@welho.com* mieluummin kirjallisena.**

Suomen Esperantoliiton paikallis- ja jäsenjärjestöt:

- Helsingin Esperantoseura / Esperanto-klubo de Helsinki, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki. 💻 www.esperanto.fi/helsinki jukka.p@esperanto.fi (Jukka Pietiläinen)
- Iisalmen Esperantoklubi / Esperantoklubo de Iisalmi, (Onni Kauppinen) Uudispihantie 298, 74100 Iisalmi.
- Jyväskylän Esperantokerho / Esperantoklubo de Jyväskylä (Seija ja Kari Kettunen), Keihäsmiehenkatu 3, 40630 Jyväskylä. ☎ (014) 254 609 💻 kari.kettunen@pp1.inet.fi
- Lahden Esperantokerho / Esperantoklubo de Lahti, (Martti Pennanen) Kalliomaankatu 10, 15150 Lahti. 💻 martti.pennanen@phnet.fi
- Oulun Esperantoseura / Esperantosocieto de Oulu, (Olli Pajula) Ojalanperäntie 47, 90860 Halosenniemi. 💻 olli.pajula@dnainternet.net
- Salon Esperantoseura / Esperantoklubo de Salo (Eero Saari) Kössinkatu 2 as 7, 24100 Salo. ☎ (02) 735 6130
- Esperantoseura Antaŭen ry. / Esperantosocieto Antaŭen, Satakunnankatu 30 C 6, 33210 Tampere. (Markku Saastamoinen, Siukolantie 9 H 12, 33470 Ylöjärvi. ☎ (050) 327 8528 💻 markku.saastamoinen@jippii.fi)
- Turun Esperanto-yhdistys ry. / Esperanto-societo en Turku, (Tiina Oittinen) Puutarhakatu 26 A 11, 20100 Turku. 💻 tiina.oittinen@pp.inet.fi

- Suomen opettajien esperantoyhdistys / Esperanto-Ligo de Finnlandaj Instruistoj, (Carola Antskog) Brokärrvägen 89, 25700 Kimito. 💻 cantskog@kolumbus.fi. Tilinro: 800015-129185
- Suomen nuorten Esperantoliitto / Finnlanda Esperantista Junulara Organizo (FEJO) Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki. 💻 fejo@esperanto.fi. Tilinro: 563000-2213606
- Sokeiden esperanto-yhdistys Steleto. (Ritva Sabelli) Pietarinkatu 10 D 27, 00140 Helsinki. 📠 (09) 660 651

Jäsenyhdistysten jäsenet ovat automaattisesti Suomen Esperantoliiton jäseniä, yhdistykset hoitavat jäsenmaksut liittoon. Liittoon voi myös kuulua henkilöjäsenenä, jolloin jäsenmaksu v. 2006 on 18 e sisältäen Esperantolehden. Nino Runeberg -seuran jäsenmaksu on 36 e. Lisätietoja jäsenyhdistyksiltä ja liiton toimihenkilöiltä.

Lappeenrannassa toimii aktiivinen esperanton harrastajien ryhmä, jolle voi lähettää postia osoitteeseen (Irja Miettinen) Esperantogrupo de Lappeenranta, Yrjönkatu 6-8 A 1, 53600 Lappeenranta.

Hämeenlinnalaisille esperantisteille voi lähettää postia osoitteella: *sarastamo@gmail.com* tai Esperantogrupeto Verda Ilo, c/o Markku Sarastamo, Jyrätie 6 a 15, 13500 Hämeenlinna.

Useiden paikkakuntien puhelinluettelosta hakusanan “Esperanto” kohdalta löytyy paikallisten harrastajien puhelinnumeroita. Paikkakuntien yhteyshenkilöistä saa tietoa myös Suomen Esperantoliitolta, aktiivisia harrastajia on mm. Mikkelissä, Raumalla ja Taivalkoskella.

## ESPERANTOLEHTI

**ilmestyy vuonna aperas dum la jaro 2006**

| Nro | Red.grupo komencas | Limdato | Aperas |
|---|---|---|---|
| 4 | 1.7. | 15.7. | 5.8. |
| 5 | 1.9. | 15.9. | 5.10. |
| 6 | 1.11. | 15.11. | 5.12. |

Avustajien toivotaan noudattavan edellä esitettyjä aikoja. La redakcio esperas, ke helpantoj atentu la datojn supre.

## Ilmoitushinnat ◆ Anoncprezoj

| Ulkopuoliset mainostajat / Ekster membraro: | Jäsenet / Membroj: |
|---|---|
| 1/1 sivu/paĝo 100 e | 1/1 sivu/paĝo 50 e |
| 1/2 sivua/paĝo 60 e | 1/2 sivua/paĝo 30 e |
| 1/4 sivua/paĝo 40 e | 1/4 sivua/paĝo 20 e |

Sendu la anoncojn aŭ rete al la redaktejo: eaflehti@esperanto.fi aŭ poŝte al la oficejo: Esperantolehti/EAF, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki.

# La voko, kutsu

Kutsun kaikki Esperantomaan asukit suunnittelemaan mukavaa logoa johtotähdeksemme.

Kerhomme haluaa olla nykyaikainen ja näkyä. Tarvitsemme graafisesti helposti toteutettavan merkin (kaksi väriä, vihreä ja musta), joka voidaan liittää esim. sähköpostiin ja T-paitoihin.

Nimi yhteisöllemme on ”LA VERDA ILO”. Vihreä (verda) on esperanton kasvua ja puolueettomuutta kuvaava väri. Ilo taas on sekä suomea että esperantoa (= koje, väline, työkalu), se on työkalu meidän kaikkien käyttöön, kaikkiin tarkoituksiin.

Olemme varanneet asiaan jopa palkinnon. Voittaja saa Markku Sarastamon maalaaman alkuperäisen akvarellin satuteoksesta ”Kreivitär ja hänen huikea elämänsä”. Palkinto luovutetaan vaatimattomasti postitse voittajalle.

Mi vokas ĉiujn loĝantojn de Esperantio konstrui amuzan simbolon por esti nia gvidilo.

Nia klubo volas esti moderna kaj videbli. Ni bezonos grafike facile realigeblan simbolon (du koloroj, verda kaj nigra), kunigeblan al ekz. retpoŝto kaj ĉemizoj.

La nomo por nia klubo estas “LA VERDA ILO”. Verda estas koloro por simboli la kreskon kaj neŭtralecon de Esperanto. Ilo estas vorto en kaj la finna (= ĝojo) kaj Esperanto, ilo por ni ĉies uzo, al ĉiuj celoj.

Ni disponas eĉ premion. La venkanto ricevos originan akvarelon de Markku Sarastamo el fabelverko ”La grafino kaj ŝia fantasta vivo”. La premio iĝos transdonata modeste per poŝto.

*Salutante*
*LA VERDA ILO*
*(Hämeenlinnalainen esperantokerho,*
*Eo-klubo en Hämeenlinna)*

*Markku Sarastamo, Sarastamo@gmail.com*

## Seuraava numero ◆ Venonta numero

Seuraava numero ilmestyy elokuussa. Jutut 15.7.2006 mennessä EAF:n toimistoon. Venonta numero aperos en aŭgusto. Artikoloj ĝis 15.7.2006 al la oficejo de EAF. Osoite/adreso: Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki, puh/tel. (09) 715 538, s-posti/rete: <*eaflehti@esperanto.fi*>.

**Pica-Paino Oy, Jyväskylä 2006**